

# Laŭokaza Novaĵletero

organo de la

**Internacia  
Komerca kaj  
Ekonomia  
Fakgrupo.**

Redakcia adreso:  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB,  
Britio.

IKEF

★

Numero 24;

1984 decembro, 1988.

Laŭokaza Novaĵletero,

decembro, 1988a.

## E n h a v o .

<u>paĝo</u>	<u>titolo(j)</u>	
2	Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.	
3	Interkonatiĝo Administrado	
4	Ne-fermita letero de la Prezidanto de IKEF.	
5	Uzo de Eo en komerca negocado	Franz Braun.
6	la sama - daŭrigo	
7	la sama - kompletigo Novaĵeroj de niaj membroj Ricevita ĉe la redakcio de nia organo	
8	Novaĵeroj de kaj pri niaj membroj Anonceto	
9	Jarfina komerco en Japanio	Seikō Yamasaki.
10	Margene al terminika laboro: Enkadra informado	Lorenz Mi.
11	la sama - kompletigo	
12	Reklamanoncetoj Teknike pri la LN-o.	

**Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.**  
Kunlaboranta faka asocio de Universala Esperanto-Asocio.

## La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario  
S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto  
D-ro István Gether  
S-ro François-Xavier Gilbert  
S-ro Lawrence Mee  
D-ro Marco Picasso  
S-ro Seikó Yamasaki

Revizoro por la financa raporto:  
D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Böhl 16, Okc. Germanio.

Financa sidejo:  
Visspaanstraat 97,  
8000 Brugge, Belgio.

Redaktoro, Laŭokaza Novaĵletero:  
S-ro Lawrence Mee,  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,  
Britio.

Prizorganto, presado-ekspedado:  
S-ro F.-X. Gilbert,  
Vert Coteau,  
Longeville-en-Barrois,  
55000 Bar-le-Duc, Francio.

-oOo-

## Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

## Pagoj — Perantoj — Kotizoj

Ciuj landoj: Baza kotizo: 400 belgaj frankoj aŭ 20 nederlandaj guldenoj.  
Dumviva membreco: unu-foja pago egala al 20-obla baza kotizo.

Postĉekkonto belga, (Bruselo):  
n-ro 000-1592629-83  
je la nomo de IKEF, p.a. R. Rotsaert,  
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio.

Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio,  
Rotterdam, Nederlando,  
je la nomo de Internacia Komerca kaj  
Ekonomia Fakgrupo, Belgio.

## Perantoj:

Britio  
- provizore vakas -

Italio  
D-ro M. Picasso,  
via De Gasperi 7,  
20057 Veduggio al Lambro.

Francio  
S-ro F.-X. Gilbert,  
Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,  
55000 Bar-le-Duc. (CCP1275-89 L Nancy)

Jugoslavio  
S-ro S. Taleski,  
ul. 'Oslo' br. 12,  
91000 Skopje.

Okc. Germanio Kotizo: 20 markoj.  
S-ro F.J. Braun,  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Böhl 16.  
(Volksbank Böhl 713120 - BLZ 66291400)

Novzelandio Kotizo: 20 dolaroj.  
S-ro J.C. Rapley,  
P.O. Box 70-038,  
Ranui, Auckland 8.

Hungario  
S-ro J. Horvath,  
Varsányi Irén u. 8,  
1027 Budapest.

Togolando  
S-ro Koffi Gbeglo,  
B.P. 13169,  
Nyékonakpoé, Lomé.

## INTERKONATIŬO

Kun plezuro ni bonvenigas novan membron al nia rondo, kaj ĝojas pro tiu ĉi aldono al niaj komunaj fortoj.

Membro-listo je 1986-12-01

79 Huffener, S-rino T.E.J.,  
Postbus 84436, 2508 AK 's-Gravenhage, Nederlando.

Kiel kutime, ni petas sciigon pri iuj ajn eraroj de detaloj en publikigitaj informoj pri niaj membroj.

## ADMINISTRADO

La Financa Konsilanto agnoskas kun danko donacon al nia Kaso, ĝis la fino de novembro.

S-ro L. Mee, (IKEF2) 571 belgaj frankoj.

La Financa Konsilanto atentigas, ke de tempo al tempo li ricevas informojn pri la Fakgrupo, de Esperantistoj en diversaj partoj de la mondo. El tiuj informoj foje rezultas nova nomo por nia membro-listo, sed foje la informoj venas el lando kun konataj transpagaj problemoj tiel, ke neniel eblas al la informpetanto pagi al ni la bezonatan kotizon. Vi povas imagi la malĝojon de la Financa Konsilanto en tiaj cirkonstancoj, ĉar vi ĉiuj scias, ke la kaso de nia Fakgrupo restas konstante en stato de ne-sufiĉo por niaj bezonoj. Pro la malavareco de kelkaj membroj niaj, foje eblas pagi la kotizon el nia Subtena Fondaĵo. Dankante ankoraŭfoje tiujn mecenatojn, S-ro Rotsaert petas atenton al du lastatempaj informpetantoj, por kiuj libera mono ne troviĝas; novaj donacoj por ebligi membrigon de ili estus tre bonvenaj.

El Ĉinio venis letero de korespondanto por la Tian Ma Turisma Servo, sciigante, ke lastatempe tiu entrepreno decidis utiligi Esperanton cele al plivastigo de siaj rilatoj kun la mondo. Ĝi havas specialajn eblecojn por ekspoziciado de varoj ĉiuspecaj, en la urbo, Shaoyang, en la provinco de Hunan, kaj krome organizas (ekonomielajn) ekspediciojn en la regiono. Ni publikigas la adreson, esperante, ke eksportistoj provu utiligi la proponatajn servojn.

Tian Ma Travel Service, Shaoyang City, Hunan, Ĉinio.

El Niĝerio venis letero de Esperantisto kies nomo ricevis mension en niaj paĝoj jam en la fruaj monatoj de nia Fakgrupo. Profesoro Godwin Oboh, kiu dum pluraj jaroj instruas nian lingvon fakultative en la Universitato de Ekpoma, anoncas la ekfunkciigon de nova kaŭĉuka kompanio, sub la aŭspicioj de la Niĝeria Esperanto-Asocio, ĝajne ligita ankoraŭ kun la Universitato. Informoj de entreprenoj en aliaj landoj, volante trovi novan fonton de kaŭĉuka latekso kaj aliaj primaraj produktoj en tiu kampo, estus bonvenigataj ĉe la adreso:

Prof. Godwin Oboh, Esperanta Komerca kaj Ekonomia Fakultato,  
Universitato de Ekpoma, P.O. Box 62, Ekpoma, Niĝerio.

(Estas interese noti, ke dum la disaŭdigo en Esperanto de Radio Vieno, jam matene je dimanĉo, la 18a de decembro, oni raportis viziton de vojaĝanto el Eŭropo, kiu lastatempe renkontiĝis kun Prof. Oboh, kaj ĝajne estas ravita pri ĉio, kiun li vidis en Ekpoma. Li raportis, ke Ekpoma situas en la apudeco de la granda urbo, Benin, ke ĝi estas vizitinda kaj ke la laboro de Prof. Oboh estas subteninda.)

Estimataj Membroj de IKEF;

Estimataj legantoj de la Laŭokaza Novaĵletero!

Rapide pasis la jaro 1988, la kvara post la fondiĝo de IKEF. Denove ni devas konstati, ke dek du monatoj estas malmulte en kiu plenumi la taskojn de unu jaro. En internacia fakgrupo kiel la nia, kie la opini-interŝanĝo okazas perletere, kaj en kiu ĉiu respondeculo havas profesion, lasantan malmulte da libera tempo al ĉi aŭ li, la fina decido kaj definitiva plenumo de iu afero daŭras longatempe. En tio, bedaŭrinde, mi mem ne estas escepto sed konfirmo de la regulo. Mi pardonpetas vin, ke mi, en la lastaj kvar monatoj pro troa profesia okupiteco kaj multe da vojaĝado, ne povis kiel kutime agadi por IKEF, sed devis lasi malstreĉa la bridon. Mia firma intenco por la nova jaro estas nun regajni la perditan terenon.

Do, kvankam ni en la pasinta jaro ne faris spektaklan progreson, tamen IKEF avancis. Ne malmultaj inter vi kontribuis per kunhelpo kaj propra agado. Kiel ekzemploj mi povas citi jenajn okazaĵojn:

- daŭrigo de la traduklaboro super la icocoo vortaro, kaj komenco de la traduklaboro super la eka vortaro, fare de S-roj Rotsaert, Wiersch kaj aliaj;
- kunveno je la 14a de junio en la Internacia Komerca Cambro en Parizo por proponi novan eldonon de la icocoo vortaro kun aldona Esperanto, fare de S-roj Gilbert, Rotsaert kaj mi;
- nia jarĉefkunveno je la 25a de julio, en la kadro de la Universala Kongreso en Roterdamo;
- vizito al la Komerca Cambro en Roterdamo je la 27a de julio, kun tradukado kaj de la prelego de la direktoro kaj de la posta diskutado, nederlande-Esperanten kaj inverse, fare de S-ro Ruig.

Tio estas tre ĝojiga, kuraĝiga kaj instiga fakto por ni ĉiuj! Nun atendas nin la taskoj de la nova jaro. Mi volas enfokusigi ilin jene:

- montri senĝene al la ne-Esperantistaro la utilon de nia lingvo, nome per taŭgaj agadoj en via ĉiutaga profesia laboro en komerco kaj ekonomio;
- reagi, aŭ ligi sekvantan propran agadon al sukcesa kaj elpruvita agado de kolego. Tio kreas sinergiefikojn;
- renkontiĝi kiel eble plej ofte kun aliaj IKEF-anoj, por interŝanĝi ideojn kaj realigi komunajn projektojn, kaj sekve plidensigi nian membrarreton;
- kiel ekonomiistoj pensi profitcele por gajni monon, kiu utilas vastasence por IKEF kaj entute por Esperanto. Oni diras, ke tia mono "kuŝas sur la strato." Ni devas nur elpensi taŭgajn metodojn por kolekti ĝin.

Nia redaktoro ĝojus, se li povus en 1989 ĉiam plenigi la LN-on per ekzemplece realigitaj agadoj.

Mi deziras al vi por la nova jaro

Sanon kaj feliĉon;  
Sukceson en via profesia laboro, kaj  
multe da sukceso en via por-IKEF-a agado.

Via,

Franz Josef Braun.

glosaro: icocoo vortaro - *Key words in international trade, de I.C.C.*;  
eka vortaro - *Economie - Finance - Monnaie, de la E.K.*

## Uzo de Esperanto en komerca negocado.

Impresoj pri komercafera vojaĝo al sudorienta Azio.

Franz Josef Braun.

Fine de novembro, kaj komence de decembro, 1988, mi estis dum du semajnoj en sudorienta Azio, kadre de komercafera vojaĝo. Mi vizitis Singapuron, Malajzion, Hongkongon kaj la terenon, Shenzhen, en suda Ĉinio. La celo de la vojaĝo estis esplori, profesikaŭze, la "merkaton" en tiu regiono; mi estas aĉetsekcimestro en granda germana industrikompanio, kaj volis respondi la demandon: kiujn varojn aŭ pecojn por nia produktado ni povus favorpreze aĉeti tie, kondiĉe, ke la kvalito estas almenaŭ same alta kiel ĉe niaj nunaj, precipe eŭropaj, liverantoj.

Lasu min komence, mallonge priskribi kion mi trovis en tiu mondparto. Mi konstatis en ĉiuj vizititaj landoj rapide pligrandiĝantan ekonomian aktivecon; la ekonomio tie kreskas nuntempe per proks. 10 procento jare, (kompare kun 2 ĝis 4 procento en Eŭropo, Usono kaj Japanio!). Mi vidis fabrikojn en kiuj laboristoj diligente kaj efike laboras por, (transkalkulita en germanaj markoj), pohora salajro de 0,50 ĝis 3,50 markoj, kaj tion en 6 - 7 labortagoj semajne, dum la pohora salajro ĉe ni sumiĝas al, malnete, ĉ. 30,00 markoj. Estas, do, kompreneble, ke firmaoj el landoj kun altaj salajroj emas translokigi partojn de siaj fabrikoj tien por malmultekoste fabrikii siajn produktaĵojn, aŭ ke ili almenaŭ provas aĉeti kiel eble plej multe da pecoj de tiaj liverantoj. Ne mirige, ke en tiu regiono la maŝinara kaj personara kapacitoj estas plene eluzitaj.

Koncerne la produktokvaliton ni devas konstati, ke tio plej ofte ankoraŭ ne atingas la nivelon necesan

por la aŭtomobilindustrio.

En Hongkongo mi renkontis mian amikon, UEA-Delegiton kaj IKEF-membron, S-ro Lee Teck Shiu. Jam ekde antaŭ tri jaroj ni ambaŭ provas kaj fine sukcesis establi komercajn rilatojn inter lia firmao, Espero Enterprise, kaj mia kompanio, Robert Bosch GmbH, surbaze de Esperanto kiel korespondlingvo. Nun li liveras al ni malgrandajn ŝtancitajn pecojn laŭ desegnaĵo de Bosch, kiujn li produktigas en aparta entrepreneto en Hongkongo, kaj pri kiuj li responsas rilate la kvaliton. Intertempe, ni mendis ĉe li novan similan pecon kun bezono de 100 000 pecoj ĉiumonate.

Kun S-ro Lee, mi vizitis en Hongkongo tri aliajn fabrikojn por esplori, ĉu liverado de ili al Bosch eblas.

Sed la plej interesas afero estis mia vizito, kun S-ro Lee, en la Speciala Ekonomia Tereno Shenzhen, en suda Ĉinio, tereno kiu havas komunan landlimon kun norda Hongkongo. En tiu tereno, la ĉina ŝtato permesas al eksterlandanoj, tute libere, krei novajn



Ĉe "Unua Unuiĝinta Aŭtomobilfabriko"; de maldekstre: S-ro Liu; S-ro Du; (ne notita); S-ro Lee; S-ro Zhang; S-ro Braun; S-ro Liu (el Guangzhou); (ne notita).

Uzo de Esperanto en komerca negocado - daŭrigo

entreprenojn, aŭ solaj aŭ kiel kunigitaj entreprenoj kun la ĉina ŝtato, (konataj anglalingve kiel *joint ventures*). Ĉiokaze, tiuj entreprenoj funkcias laŭ "okcidenta", (libermerkata), ekonomisistemo, kaj la eksterlanda entreprenisto rajtas libere disponi pri



Antaŭ la ŝtancfabriko de S-ro Ng; de maldekstre: S-ro Du; S-ro Ng; S-ro Braun; S-ro Lee.

sia parto de iu profito, kiun la entrepreno generas. Dum la jaroj, multege da hongkongaj firmaoj translokigis grandan parton de sia produktado al filio en Shenzhen, pro tio, ke kun pohoraj salajroj tie nur sesono de tiuj en Hongkongo, la produktadaj kostoj estas multe malpli altaj.

Pro tio, la entreprenoj spertas pli da profito, aŭ-kaj fariĝas pli konkurenckapablaj sur la monda merkato. Grandaj avantaĝoj por firmaoj en Hongkongo estas, kaj ke ili scipovas la ĉinan lingvon kaj konas la pensmanieron de ĉinaj laboristoj, kaj ke ili troviĝas tre proksime al Shenzhen; ili tuj povas interveni, se ekestas problemoj en sia filio tie. Fine, tiu nova produktado en Shenzhen alportas al la ekonomio de Ĉinio novajn modernajn teknikojn, kaj estigas enorman ekonomian prosperon. Ĉie en Shenzhen mi povis vidi spurojn de tio.

Trapasante la landlimon inter

Hongkongo kaj Shenzhen, ni tuj estis akceptita de S-ro Du Shou He, kiu estas prezidanto de la Shenzena Esperanto-Asocio, kaj profesie inĝeniero ĉe "Disvolva Kompanio por Speciala Ekonomia Distrikto Shenzhen," (DKSEDS). En sia akompanado troviĝis, krom aliaj Esperantistoj, la juna S-ro Liu Wei Huang, membro de la Esperanto-Asocio de Guangzhou en Kantono. Li tre bone regas Esperanton, kaj veturis 150 kilometrojn al Shenzhen nur por partopreni en renkontiĝo kun ni.

DKSEDS estas ŝtata entrepreno, kiu rolas kiel tegmenta kompanio por tiuj 165 entreprenoj en Shenzhen, kiuj apartenas, tute aŭ parte, al la ĉina ŝtato.

Post akcepta saluto en la turisma oficejo, S-ro Du gvidis nin al la uzino Shenzhen de "Unua Unuiĝinta Aŭtomobilfabriko". Tie oni montaris al ni la produktadon, kaj ni havis interesan diskuton kun S-ro Zhang, direktoro, kaj S-ro Liu, sekciestro, pri la eblecoj de kunlaborado inter tiu kompanio kaj Bosch en Germanio.

La tuta diskutado okazis Esperante-ĉine, ĉe kio funkciis kiel interpretantoj S-roj Lee, Du kaj Liu, (el Guangzhou). Poste, ni vizitis subfilion en Shenzhen la "Shanhaja Uzino por Elektra toekipaĵo", kie oni produktas sparkbobenojn por aŭtomobiloj. Kiel gasto el fremda kaj malproksima lando, mi devis prirespondi multajn demandojn.

La postan tagon ni vizitis la fabriketon de S-ro Ng, el Hongkongo, kiu je mia surprizo intertempe estis translokiginta sian tutan maŝinaron de Hongkongo al Shenzhen. Mi vidis la produktadon de la pecoj menditaj de ni, kaj ankaŭ la ĵus pretigitan ŝtancilon

Uzo de Esperanto en komerca negocado - kompletigo

por la dua peco. Do, mi akiris entute bonan impreson pri nia trovita sistemo de kunlaborado. S-ro Lee intertempe lernis la kvalitsistemon de Bosch, kaj mi fidis je li, ke sub lia aŭspicio kaj kontrolo la kvalito de la liverataj pecoj estos ĉiam sufiĉe bona por ni. Tiamaniere eblas, ke ni povas pliampleksigi niajn aĉetadojn kaj per tio plilarĝigi la praktikan utiligon de Esperanto en komerco kaj industrio.

Kroma efiko de nia vizito en Shenzhen estas; ke S-ro Du deklaris sian membriĝon en nia fakgrupo.

glosaro:  
tegmenta kompanio = anonima, (kutime akcia), kompanio kiu mastras, danke al sia(j) financa(j) partopreno(j), alian


Novaĵeroj de niaj membroj.

Nia Financa Konsilanto, S-ro Rotsaert, atentigas nin, ke "De la 8a ĝis la 15a de marto, 1989, okazos en Hannover, Okcidenta Germanio, la mondfama komputora foiro, CeBIT.

"Interalie estos komuna ekspozicio de PTT-instancoj pri elektronika poŝto. Certe tie troveblas informoj kiuj povas kompletigi mian tekston en LN 23, pĝ. 9. Fakuloj inter la IKEF-anoj, kiuj povas viziti la foiron; estas petataj raportoj pri ĝi."

Nia prizorganto pri la terminika laboro, S-ro Wiersch, faris peton al ni en la sekvantaj vortoj:

"Mi estus danka al vi se vi volus demandi en la (proksima) LN-o la abonantojn pro kunhelpo ... aparte al tiuj, kiuj disponas pri libera tempo kaj kiuj havas la lingvistikan scion necesan."



En la ŝtancfabriko de S-ro Ng; de maldekstre: laboristo; S-ro Ng; S-ro Braun; S-ro Lee; (frato de S-ro Lee); S-ro Du.

Franz Josef Braun

kompanion aŭ difinitan grupon da samnaturaj kompanioj. Komparu: 'holdingo' (evitinda) en IKEV kaj PIV.

Ricevitaj ĉe la redakcio de nia organo estas Numeroj 2 kaj 3 de TEC-bulteno, 1 informilo de la Terminologia Esperanto-Centro, kun sidejo en Berlino, Orient. Germanio.

Inter aliaj informoj, tiuj Bulteno donas liston de 103 nomoj de kunlaborantoj de la Centro, inter kiuj kvar estas konataj membroj de nia Fakgrupo. Ĉiuj el tiu kvar proponas la fakon de ekonomio, kaj do ni rajtas pensi, ke la laboro de la Centro restas en fidelaj manoj, almenaŭ en tiu faktereno.

Grande interesis nian Redakcion noti ke eminentulo de la Centro, Ak-ano Stöp-Bowitz, formale deklaris, ke "difino: (por Oficialaj Vortoj) ne estas Oficialaj".

Bulteno 2 enhavas vokon por sinanonco de fakuloj diversfakaj, kiuj laboras jam super faka terminaro, aŭ kiuj jam publikigis terminaron.

Laŭokaza Novaĵletero

Novaĵeroj, de kaj pri niaj membroj.

De nia Estrarano kaj prizorganto de presado kaj ekspedado de la LN-o, S-ro F.-X. Gilbert, en Bar-le-Duc, Francio, venis letero el kiu la entuziasmo kvazaŭ elsaltis el la folio al ni.

Estante certa, ke la informo havus grandan intereson por pluraj niaj membroj, ni fotorepresas ĝin sen ia ajn ŝanĝo. Jen ĝi.

## DANK'AL " AMSTRAD ", LA ESPERANTISTOJ ESTOS EGE KONTENTAJ !

De longe, mi serĉis modernan kaj malmultekostan aparaton por tajpi esperantlingve t.e. kun ĉapeloj sur la diversaj konsonantoj de la internacia lingvo. Mi legis multajn artikolojn pri la diversaj informatikaj programoj, kiuj permesus al aparato doni la ĉapelon ĉe la bona loko kaj en la ĝusta momento !

Mi vizitis specialajn butikojn kaj suferigis allogajn vendistinojn, kiuj respondis tro rapide : << Jes, sinjoro, mia aparato faras ĉion >>; post longa trafolumado de la dikaj dokumentoj kaj mallertaj provoj, ili mirege diris: << Estas nekredible, sed mia moderna aparato ne kapablas fari tion. Neniam vi trovos tiun-ĉi, kiun vi serĉas!>>

Feliĉe, iu angla kumputoristo skribis en gazeto ke franca aparato tiel nomata "teletekso" kapablas doni ĉapelon al la konsonantoj ; do, estas sistemo... sed multekosta. Finfine serĉante ankoraŭ, mi malkovris la rimedon de mia feliĉo :

## AMSTRAD 9512 tekstomaŝino

Por la malgrava sumo de 6500 FF, mi ricevis klavaron, personan komputoron, skribilon kun belaj litertipoj. Vi vidu mem, ĉar mi uzis tiun-ĉi aparaton por tajpi la tekston.

Se vi dezirus kontakti vendiston, vi uzu minitelon tajpante 3615 kodon " AMSTRAD ", tute simple !

F.X.GILBERT

///

Ne estas evidente de la rezultoj, ke la komputoro de via Redaktoro ankaŭ venas el la fabrikejo de la kompanio "AMSTRAD"; ĝi ja estas jam pli ol tri-jaraĝa, kaj tutevidente ĝi estas multe pli primitiva speco. Malgraŭ multaj provoj, ni ankoraŭ ne sukcesis devigi ĝin dece trakti la apartajn literojn de nia alfabeto, kaj ni prenas tiun ĉi okazon ripeti nian pardonpeton pro tio.

(Se iu volus donaci la monon, volonte ni akirus la novan specon!)

## Anonceto.

21-Jara JUNULINO, diplomitino de la Svisa Turisma Altlernejo, en Sierre, serĉas por 6 - 12 monatoj dumtempan laboron, prefere en anglalingva lando, en la studitaj kaj spertitaj kampoj de turismo aŭ-kaj enkadra informado, kun flanka celo plibonigi propran lingvoj-konon. Bone parolas jam france, angle kaj germane; parolas ankaŭ Esperante, itale kaj nederlande. Pretas pagi la vojaĝkostojn. Adreso: COVALEX S.A., 3974 Mollens, Svislando, (tel.: +41 27 56 18 20 aŭ FAX +41 27 41 62 45). F-lino Piérard.

## Kunlaboro-peto.

Nia Estrarano en Japanio, S-ro Seikō Yamasaki, kiu jam plurfoje sukcesis varbi reklamanoncon por revuo MONATO de grava entreprenado en sia lando, volas atentigi niajn legantojn pri la neceso aktive reagi al reklamanoncoj. Akirado de ripetita anonco dependas eble sole sur konstato de reagoj al pli frua anonco. Se vi legis la anoncon de MITSUI lastatempe, nepre skribu reagon al la PR Dept., Mitsui kaj kio, en Japanio. Vi ricevus broŝuron, sed pli grave helpus en la grava kampanjo, akiri anoncojn.

## Jarfina komerco en Japanio.

Faklerte gvidas nin, malkaŝe, nia membro en tiu lando, Seikō Yamasaki.

La japanoj estas konataj kiel religiaj indiferentuloj; eble ne tiel konate estas, ke ili utiligas religiajn festojn pretekste por ĝui bonan tempon festante mem, kaj por profiti komerce. Tiuj ĉi du estas en realo unu kaj sama afero.

Tio tamen ne signifas, ke ili havas nenian religion; preskaŭ ĉiuj asertas, ke religio estas necesa por si kaj, (krom la kelkcent miloj da kristanoj, la konsciaj ateistoj kaj tiuj de tendencoj marksismaj kaj diderotaj), praktikas sinkretismon de pluraj specoj da idolatrio, (ŝintoismo kaj vulgare interpretata budhismo).

Ili do celebras ankaŭ Kristnaskon. Ĝis antaŭ eble dudeko da jaroj, ĉiujare dum la nokto de la 24a de decembro, tiu gaja kvartalo de Tokio nomata la Ginza estis plena de popolaĉo, brue kantanta kaj ebria, promenante de unu nokt-oklubo al alia, iujfoje vomante, dum butikoj estis dekorataj per buntkoloraj lampetoj kaj 'kristnaskaj' arboj. Kristnasko estis unu el la pintaj debitsezonoj.

Subite okazis reakcio, oni ne scias kial. Probable la predikoj de malestimemaj kritikistoj en la gazetaro efikis por ĉesigi la stultaĵojn. Laborvenenitaj "patres familias" komencis rapidi hejmen frue, en la antaŭvespero de Kristnasko, kun pakaĵo de kristnaska kuko, (usonstila, ĉar kristnaska ŝtipo, "bûche de Noël," ne estas konata), por festi la sanktan nokton kun la familianoj.

La infanoj atendas donacon de Sankta Nikolao. Radio kaj televido disaŭdigas la popolkantojn de la sezono, (tre ŝatataj estas *Jingle Bells* kaj *White Christmas* de Bing Crosby). Nur mankas la spirito de karitato. Strange, la japanoj preskaŭ nenion scias pri Pasko.

Unu semajnon poste, oni havas la ferion de la Nova Jaro. Ĉiuj laborejoj restas fermitaj dum la tri unuaj tagoj de januaro, kaj la plimulto de entreprenoj aldone ferias ekde la 30a aŭ la 31a de

decembro. Iam oni kutimis fari vizitojn de ĝentileco, unu al alia, sed nuntempe tiu morco eksmodiĝis jam, kaj multaj iras skii en la montaroj. En la skiejoj, oni devas atendi sian vicon en viclinio antaŭ telfero, ne malofte pli ol horon. Tio estas la sezono de rapida profito por la vintraj stacioj.

Kristnasko kaj la Nova Jaro: jen nur unu el la aspektoj de la duobla vivo, kaj okcidenta kaj orienta, kiun la japanoj devas pasigi. Kompreneble, ĝi kostas.

La jarfino estas ankaŭ unu el la du sezonoj de reciprokaj aŭ unuflankaj donacoj; la alia estas en julio, okaze de la budhisma festo de Ulambano. Superbazaroj realigas grandan parton de siaj profitoj en tiuj du periodoj, ekspedantaj donacojn menditajn de la klientoj, rekte al la ricevontoj.

Kial: reciproke kaj unuflanke?

Japanio estas, karakterize de neevoluinta lando, (kiu ĝi estas), paradizo de korupteco kaj favorulismo tiel, ke komercistoj donacas al funkciuloj de kliento-entreprenejoj private, (anstataŭ malaltigi kontraktajn prezojn); civiluloj al publikaj funkciuloj, kaj, eĉ en sama laborejo, subalternuloj al siaj superuloj. La grandaj (ricevantoj!) ridetas; la malriĉuloj envias; honestuloj grimacas.

Tiel estas la japaneska jarfino.

Noto de la redaktoro.

Se en via lando, aŭ en via regiono de via lando, konataj estas kutimoj aŭ starpunktoj rekte ligitaj kun la jarŝanĝa sezono, tre verŝajne viaj membro-kolegoj ŝatus pri ili legi en la paĝoj de via Laŭokaza Novaĵletero.

Lastatempe, oni petis mian helpon trovi ekvivalentajn terminojn por fakaj esprimoj en la angla lingvo; ĉiuj el tiuj terminoj rilatas al la kampo de arto kaj tekniko konata en la angla lingvo kiel "Public Relations".

La tasko venis al mi nure pro tio, ke mi estas denaska anglo-parolanto, kvankam kredeble ligita konstato estas tio de mia membreco de IKEF. Nu! mi ne estas fakulo en la kampo de "Public Relations"; nefunda studado de la terminoj proponitaj konvinkis min, ke por la tasko trovi ekvivalentajn terminojn nepre bezonata estas vera fakulo.

Defioj plaĉas al mi, tamen. Krome, mi estas laŭ karaktero diligentulo. De la loka biblioteko mi prunteprenis studlibron pri la fako, kaj komencis studi ĝin.

Ne bezonis longan studadon por konstati, ke la termino, "Public Relations" estas mem ekstreme komplika kunmeto de du vortoj, por ambaŭ el kiuj nova signifo alligiĝas per la apudmeto de la alia vorto. La vorto "public" estas uzata en senco rekte kontraŭa al "private," kaj sekve ne en la pli simpla senco de rilate al homoj ĝenerale; la vorto "relations" akiras pli figuran, metaforan senco-kompare kun la ĉiutaga senco de kuna agado kun iu konato. Krome, diversaj kunteksto-diversrezulte modifas la signifon de la plena termino.

La plena signifo de la termino estas, proksimume: tiu kombino de arto kaj tekniko necesa dum komunikado por atingi komprenadon flanke de aliaj personoj pere de disdonado de konataĵoj pri si mem.

Oni klarigas, ke la teknikoj uzataj estas celataj atingi komprenon je ambaŭ flankoj, kaj ke oni ja lernas pri si mem pere de reagoj de la alia partio. Se el tiu klarigo ni konkludas, ke la pretendoj de la fakuloj en la kampo ne meritas atenton, ĉar tiu kombino de arto kaj teknikoj estas nenio alia ol normalaj homaj rilatoj, tiuj fakuloj ja provas tiri

ni al la neceso alimaniere pensi kiam la situacio rilatas al kunorganizado de fortoj de pluraj personoj. Ili pretendas, ke aparta lerteco estas bezonata kiam, ekzemple, registaro volas komuniki ion samtempe al la enloĝantaro de la tuta lando, aŭ kiam entrepreno volas disdoni informojn al aŭ sia klientaro aŭ al siaj dungitoj, aŭ eĉ kiam libervola bonfara asocio volas raporti konstatojn al donacintoj kaj donacontoj. Kaj tiel plu.

Sekvas el tiuj kaj similaj ekzemploj, ke ĉiuj organizaĵoj, ie kioma grandeco, kaj multaj individuaj personoj volantaj interesigi klientaron pri siaj talentoj, utiligas la teknikojn de tiu ĉi fako - ĉu aŭ ne oni tion rekonas.

Malsukcesa utiligo de la teknikoj, aŭ-kaj mallerta eksponado de la arto, diras la fakuloj, povas havi rezulton de mis-informado kaj sekve fiaskon de la provo, kun eĉ akiro de malbona reputacio en la aparta kampo de entreprenado. Se kaj kiam ekzistas konscia provado, ene de la organizaĵo, konstante informi kaj esti informita, la rezulto estas komprenado je alta nivelo, kun, ordinare, plibonigo de la reputacio de la organizaĵo mem.

Sekvas el ĉio ĝis nun, ke la foje uzata termino en nia lingvo, 'publikaj rilatoj', (estante rekta traduko nur de la vortoj de la anglalingva termino), apenaŭ taŭgas. (Estas interese noti, tiurilate, ke Munniksma en la IKEF neniel provas difini la terminon, sed ja emfazas la pripensitecon de la agadoj entreprenitaj en tiu kampo.)

La alia konata termino, uzata, inter aliaj instancoj, de Universala Esperanto-Asocio, estas 'eksteraj rilatoj', kaj ĉajne ĝi trafe taŭgas por kelkaj aŭ pluraj agadaroj sed ĝi tamen tro emfazas la ligitecon kaj reciprokecon inter la partioj; ni bezonas pli metaforan esprimon.

Re-pensante pri la neceso atingi fidindan difinon por la termino, "Public Relations," ni vole-nevole devas pensi pri informado, informado kiu povas okazi en

Enkadra informado, daŭrigo.

multaj diversaj kadroj kaj situacioj, sed kiu almenaŭ celas esti du-direkta inter la disdonanto kaj la reaganto. Proponata, do, estas la termino,

enkadra informado kun difino: agadaro, utiliganta konscian kombinaĵon de arto kaj tekniko necesa dum komunikado de informeroj pri si, flanke de unu partio, plej ofte organizaĵo, por atingi je la alia partio komprenadon kaj iun pli-malpli deziratan reagon.

Al tiu difino ni aldonu la RIM-ARKIGOn, ke kutime la 'alia partio' prialudita estas difinebla sekcio aŭ tavolo de la publiko, kaj la teknikoj prialuditaj rilatas ĉefe al elekto de la plej trafa kunmeto de vortoj, bildoj, fonoj kaj tiel plu por atingi pli-malpli precize la celatan eron de la publiko.

Ni povas doni atenton nun al derivaĵoj el la termino, kaj al aliaj terminoj bezonataj dum studado de la temo. Eble la plej taŭga komencpunkto, tiurilate, estas konstato, ke enkadra informado ne havas la simplan signifon de reklamado, nek tiu de propagando, kvankam ambaŭ el tiuj utiligas la samajn aŭ similajn teknikojn. En la plej bona senco, enkadra informado okazas sen iuj antaŭjuĝoj aŭ partizanaj preskriboj; ĝi prezentas klaran bildon kunmetitan el faktaj informeroj.

Reklamado, asertas fakuloj en la kampo de enkadra informado, estas alvoko al la publiko, rekomendante iun apartan varon, servon aŭ alian komercaĵon, emfazante tiujn ecojn de la koncerna marko plej kalkulitaj allogi aĉetontojn. Kutime, reklamado okazas per pagitaj anoncoj en spacoj disponigitaj per aliaj entreprenoj. Kontraste, enkadra informado okazas aŭ en propra ĵurnalo aŭ simile, aŭ estas akceptita senkoste flanke de redaktoroj en la gazetaro. Ĝi ne konkurencas kun reklamado.

Oni simile asertas, ke propagando laŭdifine fontas el antaŭjuĝoj, kaj strebas konvinki iun eron de la publiko oferi ion sen ia ajn konkreta rekompenco; ofte

la informeroj estas 'alinvestigitaj', kaj fona celo estas ĝis iu grado trompi la publikon. Kontraste, enkadra informado, por akiri sukceson, devas esti severe sentendenca, farata sen iu timo de posta kritika ekzamenado de motivoj aŭ kontrolado de faktoj.

Fakulo en la kampo estas konata aŭ kiel Konsultisto pri Enkadra Informado, (EI), (se ĝili laboras en aŭ respondecas pri entrepreno aŭ agentejo dediĉita profesie al disdonado de konsiloj en la kampo) aŭ kiel EI Praktikanto, (se ĝili laboras en entrepreno komercanta en alia kampo, sed en ĝi laboras ĉefe aŭ ekskluzive en la kampo de EI), aŭ kiel EI Konsilanto, se ĝili portas en iu libervola bonfara aŭ simila organizaĵo la respondecon por EI.

Ĉiuj el tiuj fakuloj rekonas la ekziston de celkaparo, kiu por si konsistigas la 'grundon' al kiu la informado estas direktita. Por tiuj fakuloj kiuj laboras en EI Agentejo, kredeble estas rekonataj pluraj celkaparoj, ĉiuj el kiuj havantaj apartajn ecojn, (la difineblaj eroj de la publiko, prialuditaj pli frue). En la angla lingvo oni aludas al tiuj celkaparoj kiel al "publics," denove ege komplika termino kvankam el ĝi unu vorto. La fakuloj rekonas, ke tiu termino estas parto de la ĵargono de la fako, kaj ke ĝi estas apenaŭ difinebla. Samtempe, ili asertas, ke tiu tiel-nomata 'speciala vorto' estas plena je signifo kaj tute diferencas disde ekvivalenta ĵargonvorto en la kampo de reklamado. Oni pretendas, ke por reklamado oni identigas celsegmenton de la aĉetonta publiko, kaj nure tion.

Identigado de la celkaparo estas fundamenta paŝo por iu ajn studo en EI, asertas la fakuloj.

Kaj tiel plu. Kaj tiel plu.

Neniel eblus diskuti la tuton de studlibro tiel dika kiel tiu, kiun mi prunteprenis, en la spaco disponebla en tiu ĉi modesta bulteno. Certe estas, ke ne havus sencan vortumtraduki la ĵargonajn terminojn en la kampo de EI.

Lorens' Mi.

## R E K L A M A N O N C O J

## Reklamarifoj:

## a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive  
ses linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:  
po 1 respondkuponon, (irpk),  
por ĉiuj komenciĝantaj ses  
linioj de 27 literospacoj.  
Ĉiam: unuope mendendaj.

## b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ  
por ĉiuj tri milimetroj de  
longeco, enkadrigita,  
sed kun minimumo de ok  
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.  
Ĉiam: tri aferoj de la sama  
anonco en sinsekvaj kajeroj  
por la prezo de du aferoj.

Kurzo: 1 irpk = 24 b.fr.

## R E K L A M A N O N C O J

## Reklamarifoj

por pli ampleksaj anoncoj:

plena paĝo 1 800 b.fr.;  
duona paĝo 900 b.fr.;  
kvarona paĝo 500 b.fr.,  
(respektive 100, 50 kaj 30  
nederlandaj guldenoj), kun  
ĉiam validaj rabatoj de 25  
elcento por membroj de IKEF  
kaj ĉiam tri aferoj de la  
sama anonco en sinsekvaj  
kajeroj por la prezo de du  
aferoj.

Varbi reklamanoncojn por  
nia organo estas tre trafa  
metodo subteni *v i a n*  
propran organizaĵon!

Por viaj propraj aferoj,  
uzu la senkoston servon de  
via propra komunikilo:  
La Laŭokaza Novaĵletero.  
Kaj ĉiam legu la  
rubrikon, Reklamanoncoj.

## R E K L A M A N O N C O J

La Skolta Esperanto-Ligo  
ankoraŭ serĉas kontaktojn  
kun iamaj skoltoj aŭ skolt-  
inoj, sed ankaŭ kun simpat-  
iantoj, kiuj volas subteni  
la disvastigon de nia solvo  
de la lingvo-problemo de la  
mondo inter geskoltoj, kaj  
de skoltismo inter Esper-  
antistoj.

Adreso:  
21 Brookfield Avenue,  
Waterloo, Liverpool,  
L22 3YE,  
B r i t i o.

## La Stelo.

La valida kurzo en Britio  
por la Stelo estas:

1.00 pundo egalas al 3.395  
Steloj. Respondecas pri ĝi  
S-ro Lorens' Mi,  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,  
Britio. Petu detalojn,  
aldonante irpk-on.

*Teknike pri la Laŭokaza Novaĵletero.*

Respondeca redaktoro de la Laŭokaza  
Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee, ĉe  
la Redakcia adreso:

19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB, Britio.

Eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero  
estas Internacia Komerca kaj Ekonomia  
Fakgrupo, ĉe la provizora ĉefsidejo:

Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bthl 16,  
Okc. Germanio.

La Redaktoro kaj Eldonanto aperigas  
subskribitajn artikolojn sen aŭtomata ak-  
cepto de respondeco por opinioj tie esp-  
rimitaj.

La rajto de represo estas malferma al  
ĉiu ajn persono aŭ instanco, kiu tiun  
rajton volas preni, kondiĉe nur, ke la  
fonto estu klare indikita.

La limdato por ricevo de materialo por  
la proksima kajero estas  
sabato, la 11a de februaro, 1989,  
en Eastleigh, Britio.

La originala teksto-paĝoj de la LN-o  
estas preparitaj sur folioj de la formato  
dinA4, (210 mm oble 297 mm), kun posta  
redukto al grandeco de A5 antaŭ presado.

La maksimume disponebla spaco por art-  
ikoloj proponataj kiel 'prespretaj', do,  
estas 180 mm en larĝeco kaj 240 mm en  
longeco. Normala skribmaŝino tajpas 71  
literospacojn en la larĝeco de 180 mili-  
metroj; alia tipo de maŝino skribas 85  
literospacojn en la sama larĝeco. Tiuj du  
ciferoj estas por ni la maksimumoj norm-  
ale uzataj.

En longeco de 240 milimetroj, normala  
skribmaŝino povas meti 56 liniojn, inkl-  
uzive de iuj liberaj linioj; aliaj apar-  
atoj, ekzemple komputoroj, povas meti en  
longeco de 240 mm, 61 linioj. Ni pretas  
akcepti aŭ unu aŭ la alia.

Oni povas pensi pri 600 vortoj kiel la  
kapacito de unu paĝo, utiligante la  
malpli grandan litertipon.

La Redakcio bonvenigus artikolojn pro-  
ponatajn por aperigo en la Laŭokaza Nov-  
aĵletero, kondiĉe ĝenerale, ke la temo  
akordiĝas kun la sinteno de la Fakgrupo,  
kaj aparte ke la teksto mem obeas la reg-  
ulojn de la Fundamento de Esperanto kaj  
konformas al la normoj de interpunkcio,  
kaj tiel plu, normalaj en la LN-oj.